

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2011/1 (aprilo 2011)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

Karaj Gekolegoj,

Jen kelkaj gravaj informoj el la lastaj monatoj.

### **AGEI-membraro**

Estas ĝojige, ke la nombro de AGEI-membroj estas stabila, eĉ estas iom da kresko. Ankaŭ ĉijare la germana estas la plej multnombra sekcio de ILEI kun 89 membroj.

### **Sukcesa Laborforpermesa Klerigsemajno VHS** (germane: Bildungsurlaub)

De la 21a ĝis la 25a de marto 2011 okazis en Herzberg am Harz oficiala klerigado dum laborforpermesa semajno organizite de la regiona popola altlernejo en Osterode (KVHS).

Certe dum la lastaj 40 jaroj en Germanio ne okazis tiaspeca altnivela kaj agnoskita Esperanto-kurso. Dek partoprenantoj (progresintoj kaj komencantoj) lernis laŭ ICH-metodoj dum 40 instruhoroj de Zsofia Korody kaj Petro Zilvar. Ne mankis gaja etoso kaj ekskursoj, ekz. al monaĥejo Walkenried, al la nova viskiofabriko en Zorge kaj belega kuraĉloko Bad Sachsa. La direktoro de la popola altlernejo Rüdiger Brakel estis tre kontenta kaj invitis al

#### **nova Klerigferiosemajno inter 5-9 marto 2012.**

Normalajn popolaltlernejajn kursojn Interkultura Centro Herzberg sukcese organizis en la antaŭaj jaroj en Göttingen kaj Northeim. En Northeim ekestis grupeto, kiu ankoraŭ kunvenadas.

Pli da detalaj raportoj kun fotoj troviĝas sub:

[http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog\\_id=45344992](http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=45344992)

Sur la hejmpaĝo de la urbo Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo <http://herzberg.de>

vi trovas multajn aliajn aktualajn informojn kaj gazetartikolojn rilate al Esperanto-aktivecoj.

### **Lerneja Esperanto-instruado**

Mi petas, ke pri via lerneja Esperanto-kurso, lerneja instruado bv. sendi mallongan informon, raporton al tiu ĉi dissendolisto kaj al Zsofia Korody, prezidanto de AGEI. Ne forgesu aldoni vian lernejan kurson ankaŭ al la kolekto de baz-, mez- kaj superlernejaj kursoj ĉe <http://edukado.net>.

Momente enestas informoj krom Herzberg pri Winterberg (Christof Krick) kaj Stuttgart (Johannes Mueller). Mi raportas pri kelkaj pli, pri kiuj mi ekhavis informojn:

### **Herzberg (3 lernejoj)**

[http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog\\_id=80969923](http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=80969923)

En la baza lernejo Nicolai nun instruas instruistino Ewa Kukielka. Ankaŭ ŝia filino Estera frekventas la Esperanto-lerngrupon. Teresa Liberska el Pollando helpas dum la instruado.

Zsofia instruas novan grupon kun ĉ. 12 gelemantoj en la meza lernejo. En la gimnazio instruas kaj Zsofia kaj Ewa. Tri gejunuloj partoprenos la Infanan Kongreseton en Danlando dank al bonvolemaj sponsoroj.

### **Erfurt (projektsemajno)**

Gimnazia instruisto Bernhard Schwaiger en Erfurt iniciatis rapidkurson kaj intensan lernadon de Esperanto dum projektsemajno. Parto, kvazaŭ fino de la dumsemajna lernado estis vizito al Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo kaj konatiĝo kun la Esperanto-biblioteko kaj vasta internacia agado de Interkultura Centro Herzberg. Dum la tago restis tempo ankaŭ por viziti la Esperanto-muzeon kaj ekspozicion en la Welf-kastelo.

[http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog\\_id=63486370](http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=63486370)

### **Münster (universitato)**

fakultativa Esperanto-lingvokurso por studentoj gvidata de Rudolf Fischer

## **Emden (universitato)**

Jen interesa iniciato de Sebastian Kirf: dum Torpedo-6 (oktobro 2010, Herzberg) prelegis Kimie Markarian pri: Sorobaneca mensa kalkulado helpe al lingvolernado. Post tio ŝi ricevis inviton de Sebastian Kirf al la universitato de Emden, kie li instruas, por prezenti la temon. Okazis vizitoj ankaŭ al loka gimnazio kie lernantoj tiel informiĝis pri Esperanto.

## **Lingvokursoj**

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg laŭ komisiono de GEA prizorgas instruadon kaj klerigadon en ĉiuj niveloj. Diversnivelaĵ (de komencantoj ĝis progresintoj, lingvokursoj preparo al ekzamenoj, ktp.) okazas plurfoje jare en intensa semajnfina formo. La sekvaj:

- 27-29 majo 2011: Intensa lernado laŭ niveloj A1 – B2 en ICH Herzberg
- 30.09. – 04.10.2011: Cseh-metoda lingvokurso. Instruado per la fama rekta metodo kun observeblo por instruistoj, instruemuloj. La trejnadon gvidos Sabine Trenner, specialisto de la metodo.
- 11-13.11.2011: Semajnfinaĵ Esperanto-kursoj en pluraj niveloj:
  - A1 - por komencantoj
  - A2 - por komencintoj
  - B1 - por daŭrigantoj
  - B2 - por progresantoj
  - C1-C2 por perfektigemuloj, instruemuloj

Bonvolu rigardi la programkalendaron por 2011 por detaloj

<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910>

## **Klerigado**

### **Studmoduloj (por bonaj lingvouzantoj, plukleriĝemuloj kaj movadaj fakuloj)**

La klerigsemajnfinoj servas al ĉiuj lernemuloj. Tute egale ĉu vi volas fariĝi Esperanto-fakulo aŭ Esperanto-instruanto, aŭ ĉu vi volas esti nur “gastaŭskultanto”, la partopreno en altnivelaĵ prelegoj, la lernado en metieja formo helpas la evoluon de ĝeneralaj lingvaj kapabloj kaj zorgas pri vastaj scioj de gramatiko, lingvistiko, literaturo, movadhistorio, instrutekniko, metodologio ktp. La partopreno kostas malmulte, por GEJ-anoj senkotize, eĉ kun repago de vojaĝkotizoj. Jen la datoj:

- majo 20- 22:51a Studmodulo de GEA-Filio en Herzberg
- septembro 30 – oktobro 04: Torpedo 7 / 52a Studmodulo: Seminario por instruistoj, instruemuloj, grupestroj, klubgvidantoj, aktivuloj, ktp. Vidu la apartan informilon. Ĉeftemo: rolo de bibliotekoj, muzeoj, kulturcentroj - praktika interagado por instruado
- decembro 9-11: 53a Studmodulo pri klerigaj temoj en ICH: literaturo, historio, didaktiko/metodiko, movadaj konoj

Datalojn pri la temoj, tabelforman prezenton de studmoduloj vi trovas ĉe

<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910> (serĉu la vortojn 'modula trejnado'). Laŭ peto kaj por neuzantoj de interreto mi volonte sendas kopion.

Post sukcesa plenumo de kondiĉoj eblas ricevi diplomon pri instrukapablo kaj movada gvidado.

## **Ekzamenoj**

B2 kaj C1-nivelaĵ UEA-ITK ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) okazis dum Printempa Semajno Internacia en Waldfishbach-Burgalben la 24an de aprilo. El Germanio partoprenis 4 kandidatoj, la parolan parton ĉiuj sukcese plenumis, espereble ankaŭ la skriba parto bone sukcesis (rezultoj atendataj).

La internaciaj KER-ekzamenoj estas tre gravaj, ĉar per tiuj internaciaj, niveligitaj ekzamenoj ni povas montri la samrangecon de Esperanto kaj ekhavi agnoskitan atestilon pri lingvaj kapabloj.

La datoj de la sekvaj ekzamenoj en B1, B2 kaj C1 niveloj estas legeblaj ĉe [edukado.net](http://edukado.net), ekz: dum UK en Kopenhago 29.07.2011, dum SES en Nitra, Slovakio 04.08.2011

Novaĵo estas la reta aliĝilo, kiu plifaciligas la administradon. Informoj ĉe

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Por prepariĝi al la ekzamenoj utiligu la testlibron 'Esperanto de nivelo al nivelo', kiu enhavas po 2 seriojn en B1, B2 kaj C1 niveloj. Ĝi estas aĉetebla por 10,50 EUR ĉe Interkultura Centro Herzberg aŭ estas mendebla de Zsofia Korody.

### **Informado, varbado, membrokotizo**

Ni dankas al ĉiuj, kiuj jam pagis siajn jarkotizojn kaj anticipe dankas al tiuj, kiuj informas, varbas por nia instruista asocio kaj helpas al gekolegoj membriĝi ekde 2011.

La membreco kostas EUR 25,- jare. Familianoj ricevas rabaton.

La kotizon (kiu enhavas la abonon de Internacia Pedagogia Revuo IPR) bonvolu sendi al la konto de AGEI: Numero 5187110500 Volksbank Schmallingenberg, BLZ 46062817

Por novaj membroj aliĝilo troviĝas ĉe la AGEI-retpaĝo <http://esperanto.de/agei> sub menupunkto Aliĝo aŭ petu tion de mi. Viajn demandojn pri membriĝo, kotizado bv. sendi al nia kasisto: Christoph Krick, Gunninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, [christof.krick@esperanto.de](mailto:christof.krick@esperanto.de)

### **Esperanto-budo ĉe Didacta 2011**

Didacta, la granda faka ekspozicio, foiro pri instruado okazis en Stuttgart inter 22-26 februaro. Dankon kaj gratulojn al Alois Eder, kiu prizorgis la varbadon, informado pri Esperanto dum tiu evento. La sekva Didacta estos en Hannover inter 14-18 februaro 2012.

### **Gazetoj, retejoj**

Certe vi rimarkis la ŝanĝojn ĉe nia ĉefa informkanalo IPR, kiun aŭtomate ricevas ĉiu membro. Ĝi aparas kun bela, kolora kovrilpaĝo. Viajn fakartikolojn vi povas rekte sendi al la redaktoro Jozefo Nemeth. Ankaŭ la gazeto Esperanto aktuell estas je dispono por instru-rilataj novaĵoj, raportoj. Sendu viajn artikolojn, informojn al la redaktoro Stano Marcek. Freŝajn informojn vi povas sendi kaj ricevi ankaŭ per la retlisto [instru-german@googlegroups.com](mailto:instru-german@googlegroups.com).

Krom bazaj asociaj informoj alvokoj, aktualaĵoj aperadas ankaŭ ĉe <http://esperanto.de/agei> sub Alvokoj.

Al retuzantoj ni rekomendas ankaŭ la regulan rigardadon de la paĝaro de <http://edukado.net> kaj <http://ilei.info>. ILEI planas baldaŭ ekfunkciigi novan, multlingvan paĝaron <http://ilei-mondo.info>.

### **Juna amiko**

La gazeto por lingvolernantoj (ne nur por infanoj!) aperas regule en bele redaktita formo kun riĉa enhavo. Tri dikaj numeroj, 3x52 paĝoj/jaro, ĉi-jare ankoraŭ por nur 14 EUR. Bv. aboni por vi mem aŭ/kaj por viaj kursanoj. Skribu al [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de)

### **Lernolibroj, faklibroj, vortaroj**

Bazaj instrumaterialoj estas mendeblaj ankaŭ de ICH-libroservo ([esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)) por kursanoj, gekolegoj.

Jen kelkaj ekzemploj: Poŝamiko, serio de trilingvaj Etvortaroj de Ilona Koutny, Tendaraĵoj kaj Nemave edifi de Stefan MacGill, Manlibro pri instruado, ktp.

Aperis ankaŭ la Detala gramatiko de Esperanto de Bertilo Wennergren eldonita de E@I kaj ILEI.

### **Eŭropaj projektoj**

Post la finiĝo de la sukcesa 2-jara Comenius-projekto Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg ellaboris novan lernejan projekton kun partneroj en Hispanio, Italio, Pollando kaj Rumanio. Ni esperas je akcepto, sed jam nun komencis kontakti la estontajn partnerojn kaj iniciatis korespondadon kun la lernantoj en la meza lernejo.

La 3-landa Grundtvig-projekto por klerigi Esperanto-instruantojn el la tiel nomata tria aĝo ĵus venas al la lasta fazo. Dum la Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis la lasta kunveno de polaj, slovakaj kaj germanaj partneroj. Sekvos raportoj, analizo de rezultoj. Teksto, fotoj ĉe <http://esperanto-urbo.de> sub menupunktoj Projektoj.

Pri la eŭropaj projektoj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg Zsofia Korody kaj Peter Zilvar prelegos dum GEK 2011 kaj ankaŭ dum UK en Kopenhago.

## **Konferencoj**

La ILEI-konferenco en 2011 estos organizata en Kopenhago, Danio inter 17-23 julio kun la tradiciaj kleriga, faka, organiza kaj kultura programoj kaj scienca simpozio. Ĝia ĉeftemo: Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado.

Detaloj, aliĝilo estas troveblaj ĉe <http://ilei.info/agado/konferencoj.php>

AGEI estos reprezentata de sia prezidanto, Zsófia Koródy, kiu ĉeestos la komitatkunsidojn, prelegos kaj gvidos seminarion.

En 2012 ILEI-konferenco okazos en Ĉinio, por 2013 Herzberg am Harz estas kandidato.

---

## **INVITO AL AGEI-JARĈEFKUNVENO**

**11.06.2011: jarĉefkunveno de AGEI dum la Germana-Nederlanda Esperanto-Kongreso (GEK) inter 16:00-17:30 en Haus Mariengrund, Nünningweg 133, D-48161 Münster, Stadtteil Gievenbeck, Tel. 0251 / 871 12-0, Faksilo: 0251 / 871 1260, <http://infohaus-mariengrund.de>**

**Detaloj, informoj pri la kongreso: [http://esperanto.de/gea/index\\_eo.html](http://esperanto.de/gea/index_eo.html)**

**Mi rekomendas partoprenon ankaŭ en la instruilataj fakaj prelegoj, kunsidoj dum GEK <http://esperanto.de/gea/GEK2011.html>**

Sehr geehrte Mitglieder,

hiermit lade ich statutengemäß zur Mitgliederversammlung am 11.06.2011 (Samstag) 16:00 in 48161 Münster, Stadtteil Gievenbeck ein. Ort der Versammlung: Haus Mariengrund, Nünningweg 133.

Vorgesehene Tagesordnung:

TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters. Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten.

Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.

TOP 2: Feststellen der Tagesordnung.

TOP 3: Kassenbericht. Bericht der Rechnungsprüfer.

TOP 4: Bericht des Vorstands. Entlastung des Vorstands.

TOP 5: Bericht über das letzte Vereinsjahres.

TOP 6: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht

TOP 7: Arbeitsplan für das neue Vereinsjahr. Ort und Zeit der nächsten Mitgliederversammlung

TOP 8: Verschiedenes

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erhofft sich daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

Dezirante al vi sukcesan instrulaboron, aktivan agadon, esperante je rezultodona jarĉefkunsido, harmonia kunlaboro, kore salutas

Zsófia Kóródy  
prezidanto de AGEI

Ps. Atentu la limdatojn de la Studsesioj kaj bv. frue anonci vian partoprenon en TORPEDo-7, la grava kunveno organizota komence de oktobro en Herzberg am Harz (vidu la apartan informilon).